


La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato de Viktorio

ĵaŭdon, la 3-an de Julio, 2014 • numero kvar

Kio okazos hodiaŭ?

★ 9 atm –
12:30 ptm:
Kursoj



★ 3:00 – 4:00 ptm
Student Union, Upper Lounge
Dancmetiejo kun Minjo
RENAUD: lernu danci per la
metodo de Margaret MORRIS

★ 4:00 ptm –
4:15 ptm
Student Un-

lastminuta
aldono!

ion, Upper Lounge Tuj post la
posttagmeza programo, Les
kaj Arlyn KERR prezentos kel-
kajn librojn el la kolekto de
David RICHARDSON.

★ 7:00 ptm – 7:30 ptm
Student Union, Upper Lounge
Chaoming Cho (Abengo)
parolos pri la “la libro de
I-ĝingo”, ankaŭ konata kiel “la
libro pri ŝanĝoj”. I-ĝingo estas
2500-jara ĉina klasikaĵo. Sur-
baze de ĝi, Abengo eĉ faros
divenojn kaj aŭgurojn por vi.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 203

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo
de la kursaro.

Se vi volas kontribui mallongan artikolo-
lon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron,
poemon, am-leteron, ktp. bonvolu
alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro
203, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al
<nask.esperanto@gmail.com>.

Lernu danci per la metodo de Margaret MORRIS

de Minjo RENAUD

Antaŭ unu jaro, dum NASK en
Raleigh (Norda Karolino), oni
povis malkovri la dancistino
Margaret MORRIS (1891–1980),
kiu influis la modernan dancon
kaj ĝian lernadon. Ĉi-jare, eta
prezentaĵo kondukos vin sur la
vojon al nova ateliero, malsama
ol la lastjara.

Minjo unue prezentos, mal-
longe,

- kiu estis Margaret Morris,
- kaj la principojn de ŝia
dancmetodo.

Kaj poste ŝi gvidos danc-
atelieron, en kiu ni iom
ekzerciĝos per tiu dancmetodo,
en tri ŝtupoj: varmigado, tekniko
kaj improvizado.



Minjo gvidas grupon en danc-ekzerco ĉe
NASK-2013, kiu okazis ĉe la Universitato
William PEACE en Raleigh, Norda Karolino.

Saluto al la KER-ekzamenotoj

de Katalin KOVÁTS

[Katalin senlace organizas la ekzame-
nojn de Komuna Eŭropa Referenckadro. Ŝi
sendis la jenan mesaĝon por niaj lernantoj,
kiuj ekzameniĝos (aŭ volas ekzameniĝi)
fine de NASK ĉi-jare. –Red.]

Kiel redaktoro de Edukado.net, mi
kore salutas vin ĉiujn, kaj deziras al vi tre
bonan kaj fruktodonan kunstudadon.

Ĝojigas min, ke vi estas tiom mult-
nombraj. Mi esperas, ke la kresko de jaro
al jaro pluiros, rememorigante nin pri la
florperiodo de la kursaro, ankaŭ de mi
spertita antaŭ multaj jaroj en San-
Francisko. Mi mem kvar-fojojn instruis

en la kursaro kaj ĉiu
fojo lasis en mi mir-
indajn rememor-
aĵojn. Estu tiel
ankaŭ por vi. Krom
la studoj amikiĝu,
babilu multe en Es-
peranto, ĝuu la kun-
eston, vivu verde.



Mi esperas renkonti vin fine de la kur-
saro, kadre de la KER-ekzamenoj. Vi ja
havos la unikan okazon trapasi ankaŭ la
oficialan lingvoekzamenon laŭ la eŭropa
referenckadro.

La aliĝilon vi trovas ĉe:

<http://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>

Rakonteto kun prepozicioj

de Derek ROFF

[Derek verkis la jenan historieton por la supera klaso. Li diras: "István petis ke ni verku ion kun la uzo de ok prepozicioj. Mi decidis provi uzi ĉiujn prepoziciojn de Esperanto, kaj mi ankaŭ elektis la uzon de prepozicioj kiel temon." –Red.]

Mia rakonteto traktas vortludon, preskaŭ ŝercon en la angla. Mi konscias, ke kiam temas pri ŝerco, klarigo estas mortigo. Do, ne estos ŝerco en Esperanto, sed pritrakto de du iom strangaj aferoj en la angla lingvo. La fundamento de la ŝerco estas vasta – sed falsa – kredo, ke estas erare fini frazon per prepozicio en la angla. Antaŭ pli ol cent jaroj, multaj profesoroj komencis admoni al siaj studentoj, kaj al homoj ekster la lernejoj kaj ĉie tra Usono, kontraŭ tiu uzo. Super ĉio, tiu admono ekzistas pro troa estimo al la latina, kaj al latinidaj lingvoj, apud malestimo al la germana.

Ĉe usonanoj, malmultaj konscias ke la angla troviĝas inter la ĉirkaŭ 50 ĝermanaj lingvoj, do, ĝi estas unu el tiuj, por kiuj fini frazon per prepozicio ne estas fremda afero. Trans la jaroj, tiu admono fariĝis regulo preter ĉia logiko. Dum pli ol jarcento, aŭtoritatoj insistas ke oni ne finu frazon per prepozicio. Nun, tre malofte oni trovas frazon en serioza kaj senmakula publikaĵo kun prepozicio je la fino.

Surbaze de tiu fono, oni kreis la vortludon, kiu finas frazon ne nur per unu prepozicio, sed per serio de ok malsamaj prepozicioj. Por usonano, estas mirinde kaj ridinde aŭdi tiun serion. Sed malantaŭ tiu kalkulo, la serio entenas plian strangajon – paron da prepozicioj, kiuj funkcias kiel unu substantivo. Mirinde, ĉu ne? Pri kio temas?

Pro sia pozicio en la terglobo, aŭstralianoj donas al sia lando kromno-

mon, kiun ni eble povus traduki per "La Lando Sub Malsuper". Pli ofte, oni vidas la mallongan version, simple "Sub Malsuper". Pro vasta uzo, tiuj du prepozicioj nun formas unu substantivon, la nomon de la lando. Laŭ mia scio, ne ekzistas alia konata esprimo en la angla, laŭ kiu paro da prepozicioj anstataŭas substantivon. Ŝajne estas unikaĵo.

Jen redono de la vortludo:

Junulino venas hejmen de la lernejo kun du libroj pri Aŭstralio. Ŝi metas ilin sur la tablon, apud la enirejo. Post la vespermanĝo, la junulino petas al sia patrino legi rakonton el unu el tiuj libroj. La patrino postulas ke la filino supreniru al la dua etaĝo, kaj purigu la dentojn. "Krom tio", la patrino daŭrigas, "loku ĉiujn ludilojn sur ties bretojn, enrampu en la liton, metu vin sub la kovrilojn, kaj post ĉio ĉi, mi venos en la dormoĉambron, kaj legos rakonton el la libro." Kaj tiel okazas, senprobleme. Preskaŭ. Sed la patrino prenas la malĝustan libron de sur la tablo. La filino tuj rekonas ke Panjo suprenportas ne la distran libron de rakontoj, sed la sekan, fakan libron pri la historio de Aŭstralio. Observante tion, ŝi priplendas antaŭ la patrino, "Panjo, pro kio vi suprenportis tiun libron el kiu mi ne volis ke vi legu al mi pri Sub Malsuper?"

En la Esperanta traduko, mi sukcesis enŝovi nur sep prepoziciojn en tiun plendan frazon, kaj ne ĉiujn je la fino. Malgraŭ mia malsukceso, retraduku la frazon al la angla, kaj vi eble trovos la serion de ok prepozicioj je la fino. Tio estas la plej longa serio de prepozicioj en la angla, kiun mi ĝis nun legis.



Angla versio: "Mommy, why did you bring that book that I didn't want to be read to out of about Down Under up for?"

Libro-premioj por verkintoj

Nia kompleza lernanto Arlyn KERR kunportis al NASK proksimume 20 Esperantajn librojn por donaci al tiuj, kiuj kontribuas artikolon al la NASKa Fasko dum la kursaro. En la fina tago, Arlyn lotumos la librojn inter la verkintoj.

Jen kelkaj el la titoloj (sed ne ĉiuj):

- ★ Plena Analiza Gramatiko
- ★ Esperanto in the Modern World by Rudiger (angla/Esperanto)
- ★ EuroTalk CD Vocabulary Builder Esperanto
- ★ KD-oj: Bonvenu Paco; Meven; Vivaj Koncertoj en Rusio
- ★ Ekzercoj al la Tuta Pasporto kaj Esperanto: Pasporto al la Tuta Mondo (teksto-kajero)
- ★ Star Trek Conversational Klingon
- ★ Tiaj Ni Estas; kaj Behold You and Me (angla traduko)
- ★ Lingvaj Respondoj de L.L. ZAMENHOF
- ★ Manlibro pri Instruado de Esperanto
- ★ The Esperanto Teacher de Mason STUTTARD
- ★ Karlo (facila legolibro)
- ★ Ne Kiel Meier!
- ★ Universitata Lernolibro de Esperanto de Gim Taekeng
- ★ Vere aŭ Fantazie de Claude PIRON
- ★ Esperanta Bildvortaro (1979)
- ★ Everyone's Own Language de Maire MULLARNEY
- ★ Manlibro Pri Ĵurnalismo
- ★ La Longnazulo
- ★ Esperanto in Fifty Lessons de Edmond PRIVAT
- ★ Kiel Diri ... kaj Tiel Diri

Vizitu la retejon de El Popola Ĉinio!

<http://www.espero.com.cn>

Ankaŭ estas kontoj ĉe Facebook, Twitter kaj Ipernity, ĉiuj kun la nomo: El Popola Ĉinio.